



Norvega Esperantisto

ESP ERANTOBLADET

N-ro 7
1964

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO
CEFREDAKTORO: JOHAN HAMMOND ROSBACH

3-a periodo
30-a (37-a) jaro
Monata

49-a Universala Kongreso de Esperanto

en Den Haag 1.—8. aŭgusto 1964

KELKAJ IMPRESOJ

Estas bedaŭrinde, ke eĉ dum la 49-a Universala Kongreso oni faris multajn nenecesajn erarojn. Mi mencias tie ĉi nur la tro malmultajn afiŝojn, la mankon de esperantaj flagoj ekster la kongresejoj, la treege ĝenan laŭparolilon, kiu ofte interrompis niajn diskutojn eĉ per informoj en aliaj lingvoj ol Esperanto, kaj la fakton, ke nur kelkaj el la kongresanoj ricevis trambileton validan por la tuta kongressemajno.

Ĉa. 2400 esperantistoj partoprenis la kongreson.

Dum la Solena Inaŭguro s-ro R. Bugge-Paulsen estis la reprezentanto de la norvega registaro. Mi mem salutis la kongreson en la nomo de Norvega Esperantista Ligo. La kunveno daŭris tro longe. Estas necese trovi rimedon por mallongigi tiun ĉi kunvenon. La inaŭgurejo estis la bele ornamita festsalonego en la impona «Kurhuys». Oni poste povis vidi parton de la kunveno en TV.

La Internacia Somera Universitato havis jenan programon: B. Popovic:

Vivo de homo sur aliaj plandoj. J. Régulo Pérez: La hispana kontraŭ la prakarnariaj lingvoj. G. Waringhien: La evoluo de la Esperanta vortrezoro. Sin'itirō Kawamura: Japanaj manĝaĵoj de nutrokemia vidpunkto. I. Lapenna: La homaj rajtoj en la Universala Deklaracio kaj Eŭropa Konvencio. O. Pancer: Donante al la homo pli da fruktoj ni plilongigos ĝian vivon. J. Wells: Konfliktaĵoj postuloj por la fonetiko de internacia lingvo. V. Peevski: Utiligo de la art-satelitoj por pacaj celoj.

Laŭ amiko mia la prelego de Wells estis eksterordinare bona. Mi ĉeestis la prelegon de V. Peevski pri art-satelitoj. Interesa temo, sed bedaŭrinde la parolanto parolis tro rapide.

Jam dimanĉon la 2-an de Aŭgusto la unuaj fakgrupoj havis siajn kunvenojn. Poste sekvis multaj aliaj. Laŭ la programo oni povis ĉeesti la kunvenojn de Bahá'í, Libersocia Rondo, Framasonoj, Instruistoj, Eŭrop-federalistoj, Fervojistoj, Sciencistoj, Skoltoj, Rotarianoj, k. t. p. Mi mem

partoprenis la kunvenon de la Internacia Asocio de Juristoj-Esperantistoj. Nia temo estis «La koncepto de proprieto kaj ĝiaj ĉefaj limigoj». Treege interesaj estis la raportoj pri la angla kaj la soveta juraj sistemoj sur tiu kampo. Estis kunveno kun faka profito.

La krimalfilmo kun esperanta parolo estis laŭ mia opinio neatendite malbona, ne pro la elparolo, sed pro la malkara enhavo. Tiu ĉi filmo ne meritis la subtenon de UEA. Ni aŭdis laŭtojn, kun signifo, sed sen nervoj. En tiu ĉi filmo nia lingvo ne vivis.

Ĝojiga estis la fakto, ke relative multaj gejunuloj partoprenis la kongreson. Hazarde mi aŭskultis la konversacion inter du anglaj knaboj kaj du nederlandaj knabinoj en tramo. En tiu ĉi kazo nia lingvo vere vivis kaj estis nervoplana.

La Nederlanda Matineo estis sukceso. Belege kantis la ĥoro. Amuzaj estis la popoldancoj. Kelkaj ĉeestantoj deziris pli da ŝanĝo. La plimulto tamen estis tre kontentaj. Nur 2 el la kantoj havis esperantan tekston.

Dum la digna Oficiala Akcepto en la malnova Ridderzaal mankis nur la invitintoj.

La Oratora Konkurso estis instrua. La ses partoprenantoj parolis sufiĉe flue, kelkfoje iom tro flue, sed kelkaj el ili elparolis la vortojn tiel malklare ke oni preskaŭ tute ne komprenis la enhavon de la frazoj. Partoprenis nur unu virino.

Almenaŭ la ekskurso, kiun mi partoprenis, nome al Amsterdam kaj Volendam, estis granda sukceso, dank' ne nur al belega vetero, sed ankaŭ al lerta, bonhumora gvidanto.

Pro treege malbone anoncita ŝanĝo en la programo mi vidis nur la lastan parton de la Prezento de la Infana Kongreseto. Ne ĉio funkciis sufiĉe bone, sed estas ĉiam interese aŭdi

infanojn, kiuj parolas la internacian lingvon. Admirinda estis la skeĉo «Hans kaj Grethe».

Ankaŭ la Distra Vespero daŭris tro longe. Oni fakte ripetis la programon. Mi preferas mallongan, altkvalitan programon.

Mi ne ĉeestis la fermon de la kongreso, sed samideano rakontis al mi, ke nia nova prezidanto estas prof. Ivo Lapenna.

T. A. Høeg.

5-kronulado al la Informfondaĵo de N.E.L.

Listo 2:

Olga Wilke, Oslo
Bj. Sorkenes, Oslo
Gerd Jæger Pettersen, Oslo
Aud Hestenes, Oslo
Kirsten Gustavsen, Oslo
R. Dreyer, Oslo
Karen Berge, Sauda
Olav Andersen, Sauda
Eldrid Andersen, Sauda
Arthur Bjerke, Sauda
Norman Birkeli, Sauda
John Malmquist, Sauda
Leif Berg, Sauda
Toralf Engebretsen, Oslo
Marit Delor, Oslo (entute 20,—)
G. Anderson, Oslo
Henry Fridén, Halden
Leonora Christensen, Laksevåg
Kristian Sivertsen, Laksevåg
Oddvin Hesjevoll, Jostedal
Børge Eriksen, Oslo (entute 10,—)
Odd Frøner, Skjåk
Harald Houen, Stavanger
Ingvald Dahl, Nesna
Olav Tryti, Vik i Sogn
(entute 25,—)
A. W. Thomson, Welling, England
Manfred Stenberg, Lycksele,
Sverige (entute 25,—)

Entute 27.

Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Redakcio: Johan Hammond Rosbach,
Hans Amund Rosbach

Adreso de redakcio: Boks 942, Oslo

Abonprezo: En Norvegujo kaj eksterlando: n. kr. 8,—.

Anoncprezoj: 1/1 paĝo kr. 150,—

1/2 p. kr. 75,—, 1/4 p. kr. 38,—

1/8 p. kr. 19,—.

Same kiel ĉiun aŭtunon

Same kiel ĉiun aŭtunon, ni salutas vin per invito al nova Esperanta agado, per instigo al laboro kaj studoj.

Eble ĝuste ĉi tiu aŭtuno estas tiu, en kiu vi vere kaj profunde interesiĝas pri Esperanto.

Eble vi trovas, ke Esperanto estas pli ol «ŝatokupo», pli ol klubaj vesperoj ĉiunonataj — kunvenoj, kiujn vi ĝis nun neglektis pro aliaj, pli gravaj aferoj, kiel ekzemple bona filmo aŭ amuza televida programo!

Multaj homoj, eĉ seriozaj homoj, okupiĝas pri Esperanto, uzanta siajn liberajn horojn por laboro, kiu donas neniun kronon en la monujon. Multaj personoj — ĉie en la mondo — skribas, verkas, instruas, prelegas, organizas, kunvenas.

Ĉar Esperanto estas ne nur «ŝatokupo»!

Pripensu tion! Bonvolu duobligi la tempon uzitan por Esperanto — aŭ eĉ nur iom plilongigi.

Jubileo

En oktobro Brita Esperanta Asocio estos 60-jara.

*

La 29-an de oktobro la Esperanto-klubo en Bergen estos 30-jara.

Sciigoj de N.E.L.

La aŭtuna agado. La estraro de N.E.L. memorigas ĉiujn klubojn kaj membrojn pri tio, ke nun ni ĉiuj devas fari eksterordinarajn klopodojn por progresigi Esperanton en nia lando. Senescepte ĉiu klubo kaj laŭeble multaj rektaj membroj devas nun starigi almenaŭ unu kurson. Se neniu loka esperantisto povas gvidi kurson, kolektu interesigantojn en studrondo, kiu povas lerni per la koresponda kurso; porvu igi iun gazeton publikigi nian gazetan kurson. - Vidu cetera la pasintan n.ron de Norvega Esperantisto.

Taskotabelo por la kluboj. Oktobro: La kluboj aranĝas kunvenon por ĉiuj esperantistoj en la loko (ĉiuj, kiuj iam partoprenis kurson), laŭeble oni sendu inviton al ĉiu unuope. La kunveno estu planita kun la celo (re)membriĝi ilin. Antaŭ la 15a la sekretario sendas al N.E.L. (kun kopio al la distrikto) raporton pri la 3a jarkvarono (blankedo A10). La kasisto sendas al N.E.L. (kaj al la distrikto) kotizon kaj liston de novaj membroj kaj de eventualaj malfrue pagintaj malnovaj membroj. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato.

Nordlanda Esperanto-Kongreso okazos en Oslo dum la tagoj ĉirkaŭ la 20a de Junio 1965, kaj la landa kunveno de N.E.L. okazos dum tiu kongreso. Preparu vin jam nun por partopreno en tiu unika aranĝo!

La 50-a Universala Kongreso okazos en Tokjo, Japanujo, dum la unua semajno de aŭgusto 1965.

Estos unika okazo vidi la Orienton! Informu jam nun al N.E.L. se vi nur pripensas partoprenon en la kongreso kaj en la planata skandinavia aeroplana karavano. Ni devas frue scii ĉu ni povos pleniĝi la aeroplanon.

Raporto de la Liga Estraro pri la 2a jarkvarono. Oni okazigis 2 estrarkunvenojn kaj elsendis unu cirkuleron al la kluboj. Oni elektis Otto Prytz kiel novan komisiiton pri blinduloj. Surbaze de la pozitivaj respondoj de la kluboj kaj rektaj membroj la Liga Estraro decidis kunlabori en la kampanjo proponita de U.E.A. por vasta antaŭenigo de Esperanto en kombino kun la «Jaro de Internacia Kunlaboro» de UNESKO en 1965; sed oni kritikis la tekston de la blankedo por kolektado de subskriboj. — N.E.L. reprezentigis en la ĝenerala kunveno de Eldonejo Esperanto A/S per 243 voĉoj. Oni elektis Tom Arbo Høeg reprezentanto de N.E.L. al la 49a U.K. en Hago, R. Bugge-Paulsen reprezentis la registaron. Oni diskutis kiel utiligi stokojn de malnovaj numeroj de Norvega Esperantisto kaj la eblecojn de nova eldono de «Faktoj pri Norvegujo». La Turistrafika Asocio de Oslo eldonis novan broŝuron pri la ĉefurbo en Esperanto — 10 000 ekzempleroj, la stoko elĉerpiĝis en du monatoj, kaj la asocio tuj presigis pliajn 10 000.

La Liga Estraro.

Korespondu!

Deziras korespondi kun norveginoj s.ino Radzik Janina, ul. Berczynska 42 - 14, Warszawa, poŝto 33, Polujo.

Informoj de la Ekzamena Komisiono

Ekzamenoj plenumitaj. Dum Junio 1964 elementan ekzamenon sukcese plenumis en Oslo Gunleik Bergrud, Olav Ekkeren, Inger Gjertsen, Solveig Haugen, Aslaug Refsing, Bjarne Sorknes. — Plie okazis speciala ekzameno por popollernejanoj, kiun sukcese plenumis: Kjell Andresen, Petter Borgen, Ørnulf Dahler, Einar Kaspersen, Marianne Mansrud, Jan Stensrud, Rolf Strøm, Stein Undheim, Sverre Undheim, Kjell Aaser.

Ordinaraj aŭtunaj ekzamenoj. Ekzamenoj okazos ĉirkaŭ la 1-a de Decembro 1964. Instruistan ekzamenon oni povos fari en Oslo, superan kaj elementan ekzamenojn en Oslo, Bergen, Haugesund, Sarpsborg, Sauda, Stavanger, Tromsø kaj Trondheim. Oni anoncu sin sur la presitaj skemoj riceveblaj de la ekzamenaj komitatoj aŭ rekte de la Ekzamena Komisiono. Oni sendu la skemojn al tiu komitato, ĉe kiu oni intencas fari la ekzamenon, *antaŭ la 1-a de Novembro.* Personoj, kiuj faros la ekzamenon ne en Oslo, plenu po 2 — du — skemojn. *Plenu la skemojn precize kaj komplete! Aliĝoj, kiuj alvenos post la 1-a de Novembro, ne estos konsiderataj.*

Jenaj helpiloj por la sinpreparado al ekzamenoj estas aĉeteblaj ĉe la Ekzamena Komisiono, Boks 942, Oslo, poŝtgirokonto 100.34:

Ekzercaj taskaroj: Kajero I: traduktaskoj por elementa ekzameno. — Kajero II: diktajoj por elementa ekzameno. — Kajero III: traduktaskoj por supera ekzameno kaj taskoj por instruista ekzameno. Prezo por unu kajero: kr. 1,00 + afranko.

Vortlisto por Adi: La Forto de l' Vero, kr. 0,50 + afranko.

Ekzamena Regularo kun ekzamenaj programoj kaj konsiloj pri lernolibr-

† Didrik Didriksen

Pianagordisto Didrik Didriksen mortis la 10an de decembro 1963. Li naskiĝis la 12an de aŭgusto 1894 en Eikeland apud Lillesand. Didriksen estis blindulo, kaj en 1903 li komencis en la bindula lernejo en Kristiano, kie li esperantistiĝis en 1910 pere de kurso, kiun H. Bonnevie kaj O. B. Sletterød gvidis por la blinduloj.

Post la lernejo Didriksen praktikis korboplektadon, sed en 1929 li komencis studi pianagordadon. Li estis vitala persono kun multaj intereso. Didriksen multe laboris por la blindula afero kaj estis ĉ. 1920 vojaĝanta paroladanto por la blindula organizaĵo. Krome li estis fervora esperantisto kaj gvidis plurajn kursojn en Grimstad, Arendal k.a. Li ankaŭ estis eminenta interpretisto dum publikaj prelegoj de eksterlandaj esperantistoj. Didriksen ankaŭ estis bontemplano kaj fervora teozofo. Li i.a. redaktis la teozofian esperantogazeton «Per lumo al vero», eld. en Stocksund, Svedujo, en brajla skribo ĉ. 1920. Poste, ĉ. 1934, li redaktis la brajlan esperantogazeton «Antaŭen», eld. en Bergen.

Didriksen tradukis plurajn norvegajn poemojn en Esperanton, kaj en 1934 li eldonis la brajlan esperantokantaron «Kantoj Norvegaj» nur kun propraj tradukoj. Li partoprenis en pluraj esperantokongresoj, kaj en 1937 li ricevis la Arĝentan Stelon dum la UK en Varsovio.

Ripozu li en paco!

LKH

oj kaj literaturo, kr. 0,50 + afranko.

Notu ke ĉi tiujn helpilojn oni aĉetas ĉe la Ekzamena Komisiono.

Ekzamena Komisiono de N.E.L.
C. Støp-Bowitz, Prezidanto

ŜIPOJ BRULIGITAJ

de Henrik Ibsen

*Siajn ŝipojn direktis de Nordo li for,
serĉis diojn plilumajn li kun fervoro'.*

*De l' Neĝlando la baŭnoj subiĝis
je vidlim',
per Sunstrandaj la faŭnoj kontentiĝis
la anim'.*

*Bruligis li la ŝipojn; — la fumo
kvazaŭ pont'
sin norden etendis al trans valoj kaj
mont'.*

*Neĝolandon rajdant' el sunriĉa
florval'
ĉiunokte rapidas per sonĝo-ĉeval'.*

Trad: Didrik Didriksen

† Martinus A. Halsbog

Instruisto Martinus A. Halsbog, Bolsøya, mortis la 12an de julio 1964. Li naskiĝis la 3an de junio 1902 kaj estis instruisto en Indre Aure, Hatlane, Laupstad kaj Bolsøya. En 1928 li ekstudis Esperanton kiel aŭtodidakto pere de la lernolibro de Riefling, kaj li estis membro de Alesund Esperantoklubb 1935—37.

Halsbog partoprenis la universalajn esperantokongresojn en Malmö 1948, Paris 1950, Oslo 1952, Bologna 1955 kaj Sofia 1963. Li anoncis sin por la kongreso en Hago, kaj ankaŭ konsentis reprezenti N.E.L.n ĉe la Bulgara Esperanto-kongreso ĉi-somere; sed pro kormalsaniĝo li devis nuligi ĉiujn planojn, kaj post mallonga malsano li neatendite forpasis. Multaj estas la esperantistoj enlandaj kaj eksterlandaj, kun kiuj li konatiĝis, kaj karmemore li estos funebrata.

Paco al lia cindro!

LKH

Alfred Eriksen 70-jara

Malnova esperantisto en Narvik, ladisto Alfred Eriksen, naskiĝis la 12an de aŭgusto 1894 en Ibestad apud Harstad. Oni ne scias, kiam li esperantistiĝis, sed aŭtune 1930 li prenis la iniciaton inviti la Cseh-instruiston Jens Schjerve al Narvik por fari kurson tie. Por ebligi la inviton Eriksen fondis Narvik Esperantoklubb de intereso en novembro 1930. Schjerve komencis sian kurson meze de decembro kun 58 partoprenantoj, kaj al la finesto en februaro 1931 Eriksen invitis la tutan instruistaron en Narvik, kune kun la urba konsilantaro kaj la urbestro mem!

Eriksen estis prez. de Narvik Esperantoklubb 1930-31. Post la kursoj de O. T. Nicolaisen en 1935 la klubo refondiĝis sub la nomo «Malmsonoro» kaj Eriksen estis ĝia prez. kaj vicprez. 1937-38. Por la tria fojo la klubo ŝanĝis sian nomon en 1938, kaj tiam al: La klubo «Esperangulo». Eriksen estis prez. de tiu klubo 1938-39.

En 1938 Eriksen plenumis la elementan ekzamenon, kaj la saman jaron li elektiĝis estrarano de NEL kaj funkciis ĝis la ekkrako de la milito. Tiam li fuĝis al Svedujo, kaj poste ni nenion aŭdis pri li. Tial, se iuj el niaj legantoj en Norvegujo aŭ Svedujo povus doni al ni pliajn informojn pri li, ni estus tre dankemaj.

LKH

*

Simon Gjerde 70-jara

Fervoja laborejestro, Simon Gjerde, Trondheim, estis 70-jara 30. de julio 1964. Li esperantistiĝis en 1932 kiel aŭtodidakto kaj fariĝis membro de Laborista Esperantoklubo en Trondheim 1933-38. En 1936 li partoprenis kurson de la germana esperantisto Emil Strohmeier, kaj li fariĝis membro de la nova esp.-klubo «Antaŭen»

en Trondheim 1936-40. Post la milito Gjerde estis membro de Grupo Esperantista.

Ni kore gratulas!

LKH

*

Magnus Tveit 65-jara

La konata esperantisto, lokomotivmajstro Magnus Tveit, Trondheim, naskiĝis en Holmedal, Sunnfjord, la 17an de julio 1899. Li esperantistiĝis en Hamar pere de kurso de Ottmar Fischer en 1931. En Hamar Tveit estis unu el la gvidantoj de la esperanta laboro, kune kun J. A. Kleven kaj G. Johannessen, kaj li estis prez. de «La Norda Stelo» 1936-39. Tveit ankaŭ estis Delegito de IEL por Hamar 1946-47. Poste li translokiĝis al Trondheim kaj elektiĝis vicprez. de Grupo Esperantista de Trondheim 1948-49, 1955-57 kaj prez. 1951-53. En Meza Distrikto de NEL Tveit estis sekr. de 1962, kaj de 1948 li estas instruisto ĉe la leterkurso de NEL.

En 1951 li fariĝis Kavaliro de la 1a klaso de PRO MERITO. Korajn gratulojn al nia fervora propagandisto!

LKH

*

Henry Fridén 60-jara

La fervora tradukisto, kontoristo Henry Fridén, Halden, naskiĝis la 27. de aŭgusto 1904. Li esperantistiĝis jam en 1920 kiel aŭtodidakto, kaj de 1924 li estis estrarano de Norvega Asocio de Laboristaj Esperantistoj (NALE). En 1935 li fondis la laboristan esperantoklubon «Ascendo» en Halden, kies unua kaj ĝis nun sola prez. li estis! La klubo aliĝis al la distriktoorganizaĵo «Esperanto-Asocio de Østfold», kaj nur en 1944 la klubo aliĝis al NEL. Fridén estis Del. de UEA por Halden 1927-30 kaj depost 1945, kaj Fakdel. (muziko) de 1958.

Sennombraj estas la literaturaĵoj,

kiujn Fridén tradukis esperanten, kaj li plurajn fojojn partoprenis en Belartaj Konkursoj de UEA. En la branĉo tradukita poezio li ricevis jenajn premiojn: 1953 5a premio, 1956 laŭda mencio, 1957 laŭda mencio, 1958 3a premio, 1961 3a premio, 1962 2a premio kaj 1964 4a premio. Li ankaŭ dum multaj jaroj redaktas la rubrikon «Por novuloj kaj lernemuloj» en Norvega Esperantisto.

En 1955 li fariĝis Kavaliro de la 2a klaso de PRO MERITO.

Ni sendas niajn plej korajn gratulojn al la jubileulo!

LKH

*

Erling Anker Haugen 55-jara

Nia eminenta esperantopoeto kaj tradukisto, disponanto Erling Anker Haugen, estis 55-jara la 11an de aŭgusto 1964. Li fariĝis esperantisto jam en 1925 kiel aŭtodidakto. De 1936 li estis membro de Grupo Esperantista, kaj li estis Vicdel. de UEA por Trondheim 1939-45 kaj Del. de 1945. En 1945 li plenumis la superan ekzamenon de Esperanto.

Haugen verkis multajn poemojn kaj prologojn en Esperanto kaj tradukis sennombrajn kantojn kaj novelojn. Lia ĉefa laboro estas la brila traduko de la majstroverko de Ibsen, «Peer Gynt» (Trondheim 1951). — Haugen ankaŭ estis kunlaboranto de «Esperantobladet» kaj «Literatura Mondo» kaj kunredaktoro de «Nia Kantaro» (Oslo 1954). Li ankaŭ estis kunlaboranto de «Esperanto-norsk ordbok» (Oslo 1949) de Ragnv. Rian kaj kunverkanto de «Norsk-Esperanto ordbok» (Oslo 1963). Haugen plurajn fojojn estis juĝanto dum Belartaj Konkursoj de UEA.

En 1955 li fariĝis Kavaliro de la 1a klaso de PRO MERITO.

Niajn plej korajn salutojn!

LKH

Hans Amund Rosbach 40-jara

La kunredaktoro de Norvega Esperantisto, pastro Hans Amund Rosbach, Follidal, naskiĝis la 9an de septembro 1924 en Røros. Li partoprenis la Csehkurson de O. T. Nicolaisen en Røros en 1939, sed li eklernis la lingvon jam iomete antaŭe. Li estis membro de Røros Esperantoklubb 1939-40, kaj poste membro de Grupo Esperantista de Trondheim 1940-41 dum li vizitis la gimnazion en Tr.heim. Post la milito li estis membro de Klubo Esperantista dum li studis teologion en Oslo.

En 1951 Rosbach fondis la klubon «La Monto» en Røros kaj estis ĝia unua prez. 1951-52. De 1946 li estis landa reprezentanto de Universala Ligo kaj Fakdel. (religio) por Oslo 1948-52, Del. por Røros 1952, Hasvik 1953-59 kaj Follidal de 1959. En 1947-1950 li estis ĝen.sekr. de NEL kaj en 1950-51 estrarano de NEL. Nacia Agento por Skolta Esperantista Ligo li estis de 1961 kaj ĉefredaktoro de «La Skolta Mondo» de la printempo 1964. Li ankaŭ estas membro de KELI. En 1950 li plenumis la instruistan ekzamenon de Esperanto.

Rosbach en 1947 prenis sur sin la taskon esti kunredaktoro de nia gazeto, kaj tiun oficon li ankoraŭ okupas. De temp' al tempo Rosbach tradukis multajn poemojn en Esperanto, speciale himnojn. Li ankaŭ partoprenis en Belartaj Konkursoj de UEA kaj ricevis jenajn premiojn: 1955 3a premio kaj 1957 laŭda mencio.

En 1958 li fariĝis Kavaliro de la 1a klaso de PRO MERITO. Gratulojn kaj bondezirojn al nia energia kunredaktoro!

LKH

Jupregata edzo iĝis terure malgaja, kiam lia edzino naskis filinon.

Li konfidis al sia amiko: «Mi esperis pri knabo por helpi min ĉe mia mastruma laboro.»

El la 20-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO

La plej gravaj rezultoj de la estraraj komitatataj diskutoj estas:

1. Elekto de nova estraro de la internacia TEJO. La prezidanton G. Becker (Germanujo-Saarlando), kiu gvidis la organizon dum 8 jaroj, sekvis Ivo Osibov (Jugosl.), ĝisnun redaktoro de «La Juna Vivo». Dum tiuj 8 jaroj la membro-nombro de TEJO kreskis de proks. 1000 ĝis preskaŭ 10 000; la landaj sekcioj pliiĝis ĝis 18 en ĉiuj kvin kontinentoj. Ankaŭ la revuo «Kontakto» ekestis en tiu periodo. S-ro Becker, kiun la Komitato de UEA elektis ĝenerala sekretario de UEA, ekestis la unua honora prezidanto de TEJO. Aliaj membroj de la estraro nun estas: S. Simeonov (Bulg.) kaj H. Tonkin (Usono), vicprezidantoj, C. Minnaja (Italujo) ĝen. sekr.; U. Lins (Germanujo) kasisto; S. Zlatnar (Jugosl.), Y. Umeda (Japanujo) kaj M. Pietrzak (Polujo), membroj.

2. Decido pri kunlaboro en la «jaro pri internacia kunlaboro», kiun pro-

klamis la U.N. Koncerna komisiono indikos pli precizajn paŝojn farendajn. Tamen oni jam decidis helpi la kampanjon komencitan de UEA pri varbado de subskriboj por «Propono», prezentota al la U.N. Ĉiu TEJO-membro estas petita helpi, mendante kelkajn listojn kaj plenigante tiujn per subskriboj de siaj geamikoj kaj gekonatoj. Listoj kun Esperantoteksto estas haveblaj ĉe la CO de UEA.

3. Oni instalas komisionojn por daŭrigo kaj plivastigo de:

- kontaktoj kun ne-esperantistaj junularaj organizaĵoj (NEO)

- esploro de la lingva problemo en Afriko (surbaze de la raporto de CEA)

- evoluigo de la internaciaj kontaktoj inter lernejoj, sin bazante sur la rekomendoj de la «internacia konferenco de lernejoj en kiuj Esperanto estas instruata». (Beograd 1963).

Inter la 25 diversaj naciecoj troviĝis: Usono, Kanado, Mali, Hindujo, Togo, Japanujo, kaj multaj orienteŭropaj kaj okcidentaj landoj.

Konkurso

1958 - 1952 - 1923 - 1965 - 1926 - 1937 -
Antaŭnomo de la ĉefpersono de la
konkurso solvo - 1908 - 1926 - 1930.

Se vi elektos por ĉiu el la supraĵoj jaroj la ĝustan vorton (en Esperanta formo) kaj trovos la koncernan nomon, vi povos el la komencliteroj de la dek vortoj formi la vorton, kiu estas la solvo de la enigmo.

Sendu la solvojn (kiuj devas enhavi ankaŭ la dek koncernajn vortojn) al la Redakcio kiel eble plej baldaŭ, kaj nepre antaŭ la 1-a de novembro.

Aŭtunaj Internaciaj FERIAJ Esp-kursoj

en VEJLE, Danlando, okazos ĉi-jare 18.—25. de okt. en Sporta Altlernejo — tre bela regiono. Unu- kaj du-personaj ĉambroj kun plena pensio. Kursoj elementa (naturmetoda), perfektiga kaj konversacia.

Detala programo havebla ĉe

L. FRIIS
Ingemannsvej 9
Åbyhøj, Danlando



17-a Internacia Fervoja Esperanto Kongreso

Kongreskotizo: ĝis 1.1 1965: n.kr. 30,-
ĝis 1.3 1965: n.kr. 40,-
poste : n.kr. 50,-
Familianoj, junuloj, pensiuloj: 50 %.

En la kongreso povas partopreni maksimume 500 personoj. Aliĝiloj kaj kongreskotizoj kiuj alvenos post 20.4 1965 ne validos.

PRI LOĜEJOJ:

La loĝejon vi bonvolu mendi per la aliĝilo. La indikitaj prezoj estas proksimumaj, ili koncernas dormlokon kaj matenmanĝon, kun servmono enkalkulita.

1) Hoteloj:

	Unulita ĉambro
Kategorio A:	n. kr. 35,00—46,00
B:	n. kr. 33,50—38,50
C:	n. kr. 25,00—34,00
D:	n. kr. 22,50—24,50

	Dulita ĉambro
Kategorio A:	n. kr. 65,00—73,00
B:	n. kr. 48,50—58,50
C:	n. kr. 39,00—47,00
D:	n. kr. 36,50—39,50

La pli malalta prezo estas por ĉambro — la pli alta prezo estas por ĉambro kun banejo aŭ duŝo. La hoteloj situas proksime de la kongresejo.

2) Aŭtomobilisthotelo:

Ĉambro en la ĉefdomo:	n. kr. 22,—
Lito en kabano:	n. kr. 15,—

Inter la kongresejo kaj la Aŭtomobilisthotelo trafikaj aŭtobusoj.

3) Junulargastejo:

En kvarlita ĉambro:	n. kr. 12,50
Lito en amasloĝejo:	n. kr. 10,50

4) Oni ankaŭ povas havigi al la kongresanoj privatajn loĝejojn, prezoj poste en «La Internacia Fervojo»

PRI LA EKSKURSOJ:

a. Duontaga ekskurso al Elverum, kun vizito en muzeoj kaj vespermanĝo: n. kr. 15,—.

b. Duontaga ekskurso sur lago Mjøsa al la najbarurbo Gjøvik, sen manĝo: n. kr. 10,—.

c. Tuttaga ekskurso al Lillehammer kun tag- kaj vespermanĝo kaj vizito en Maihaugen Popolmuzeo, cetere vizito al Sjusjøen en la norvega altmontaro, n. kr. 40,—.
(Proksimuma prezo)

La kongresmarko montras al vi du el la vidindaĵoj de la kongresurbo, nome la mezepoka katedralruino, kaj lokomotivo en la Norvega Fervojuzeo.

La tuta urbo kaj LKK salutas vin bonvenon al la 17a kongreso de IFEF en idiliaj, agrablaj ĉirkaŭaĵoj.

Ĉeĥoslovaka fervoj-inĝeniero

Jaromir Rebiček kun edzino deziras partopreni la fervojistan kongreson en Hamar en majo 1965, sed ĉar oni ne rajtas kunporti monon el Ĉeĥoslovakujo, li proponas reciprokan gastigadon: se iu norvega samideano estos preta gastigi ilin dum la kongreso, aŭ pagi ilian restadon tie ĉi, li gastigos la «financanton» dum unu semajno, aŭ eventuale pli longedaŭro, en kiu ajn somerrestadejo en Ĉeĥoslovakujo. — Interesiĝantoj bonvolu turni sin al N.E.L.

C. Støp-Bowitz.

RECENZOJ

«Juĝu mem!» *Faktoj pri Ĉeĥoslovakio*
Eldonejo Orbis 1961, Praha.

Jen bela verko, poŝformata, pri Ĉeĥoslovakio. Bona preso, bone redaktita, kun multe da fotografiaĵoj. Ĝi entenas multajn informojn pri tiu malgranda lando meze inter la grand-potencoj: situo, loĝantaro, historio, agrikulturo, politika reĝimo, industrio kaj komerco, jura kaj materia pozicio de la familio, sindikatoj, sanitara kaj sociala prizorgo, instruado, klerigo kaj kulturo, muziko, arto, literaturo kaj laste sporto kaj trafiko.

Libro kia tiu-ĉi certe estas kapabla por pruvi, se nenio alia estas, ke Esperanto estas plene taŭga por komuniki ekzaktajn sciigojn pri la socia stato de alia lando. En la fino bonega landkarto.

H. F.

DU ĈINAJ ELDONAĴOJ :

1) *Maŭ Zedong*: Raporto al la dua plena sesio de la sepa centra komitato de la komunista partio de Ĉinio. — Eldonita de Ĉina Esperanto-Ligo en 1961 (28 pĝ), bele bindita, skribita en bonega Zamenhofa lingvo. En post-notoj iom da historiko pri la venko de la komunistoj super Kuomintang

2) *Apologiistoj de Novkoloniismo*. Eldonita de «Fremdlingva Eldonejo», Pekino 1964. Dum la libro de Maŭ Zedong ĉefe traktas internajn ĉinajn aferojn, tiu ĉi kajero nin metas en la fokuso de la ideologia lukto inter la du superpotencoj komunistaj kaj traktas la du malsamajn vidpunktojn rilate al la malriĉaj, «subpremataj» popoloj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko. La libreto entute ĵetas bonan lumon sur la problemojn, kiuj formas la kernon de la lukto en la komunista tendaro. — Bona lingvaĵo. Vidu pĝ. 22 la eraran uzon de 'jes' anstataŭ «ja». Mi preferus la formon «Koreo» anst. Koreio.

H. F.

Gaja lernanto per Esperanto
de P. E. Schwerin.

2a eldono. Prezo 2 ŝil. + afr. 4p.
(48 pĝ.) Eld. de The Esperanto
Publishing Co. Ltd. Mendebila ĉe:
Norsk Esperanto Forlag A/S.

La aŭtoro diras en sia antaŭparolo i. a.: «Ridado ne povas anstataŭi propran lernadon — sukceso ne venas sen klopodo — sed certe faras ĝin multfoje pli agrabla . . . »

La bela libro enhavas spritaĵojn, vortludojn, anekdotojn, matematikaĵojn kaj bone taŭgas kiel distraĵo en grupvesperoj, klubkunvenoj kaj

Kion signifas **rezino**? — Kiel diri en Esperanto **lyngmark**?
Se vi ne scias, uzu:

Ragnv. Rian: **Esperanto-Norsk ordbok**
174 paĝoj. — Prezo: Kr. 16,00 plus afranko.

kaj Ragnv. Rian,
E. A. Haugen: **Norsk-Esperanto ordbok**
374 paĝoj. — Prezo: Kr. 25,00 plus afranko.

Boks 942, Oslo ELDONEJO ESPERANTO A/S Poŝtĝiro 100 31

La 16-a Kongreso de Internacia Fervojista Esperanta Federacio

okazis en Bruselo la 8.—15. de Majo. Partoprenis 600 gekolegoj de preskaŭ ĉiuj landoj en Eŭropo. La kongresejo, kiu situis en la centra stacio, estis senpage elpruntita de la fervojadministracio. Ĉi tie kolektiĝis la partoprenantoj; en la apudaj salonoj okazis la kunvenoj de la diversaj komitatoj.

La prezidanto de la norvega sekcio, s.ro Per Johan Krogstie invitis al la venontjara kongreso en Hamar 22.—28. Majo, kaj la nederlanda sekcio invitis al la kongreso en 1966 en Utrecht.

La kutima fakprelego ĉi tiu fojon temis pri «La aplikado de la elektroniko al la Nacia Societo de la Belgaj Fervojoj». Ankaŭ estis montrata kolorfilmo pri la 125-jara evoluado kaj historio de la Belgaj Fervojoj.

Estis aranĝataj pluraj ekskursoj, i. a. per aŭtobusoj tra Bruselo kaj ĉirkaŭaĵo kaj per aŭtobusoj al la historie konata loko Waterloo.

Estis tuttaga ekskurso per trajno al la idilia urbeto Dinant en la suda Belgio en la Ardennoj.

Post la reveno al la urbo ni boat-ekskursis sur la rivero Meuse, bona okazo por rigardi la belan pejzaĝon en ĉi tiu parto de la lando.

Dum la antaŭlasta tago de la kongreso ĉiuj partoprenantoj iris en procesio gvidata de la fervoja orkestro al La granda Placo - Le grand Place, kie la orkestro faris koncerton. Duri la koncerto la delegitoj de la landaj sekcioj estis invitataj al la magistrato kie ili estis regalataj.

Pro la bonaj antaŭpreparadoj de niaj belgaj kolegoj la kongreso bone sukcesis, kaj la partoprenantoj disiĝis kun «Ĝis revido en Hamar 1964».

Odd Kolbrek.

studecirkloj. Speciale mi atentigas pri la rubriko: Konsiloj por grupestroj kaj kursgvidantoj.

Mi absolute rekomendas la libron por la klubanoj, studgvidantoj kaj kursestroj. Nur rimarko rilate al la ludaĵo: Fajro, aero, akvo (kial ne ankaŭ tero?) Ĉe ni oni ĉe la vorto «fajro» ŝanĝas lokojn, sed tio eble ja estas nacia kutimo . . .

H. F.

Eta interpretisto. Turisma frazaro
(franca)

de M. Rétot, prezo 105 Fr.fr. aŭ
3 int. respondkuponoj.

Bonega ideo, sed oni devus pliampleksigi la libron al formo de vojaĝa gvidlibro. La libreto enhavas frazaron esperantan kun traduko en la francan kun proksimuma elparolo. La preslitteroj ne estas bonaj, sed tamen sufiĉe legeblaj. La prononcaj signoj donas bonan indikon pri la elparolo. Tamen mi ŝatus havi la literon «û» por la nazala sono en *un* (ne ê).

Mi rekomendas la libron al Esperantistoj kiuj vojaĝos al Francujo, kaj ŝatas aŭ estos devigataj iom helpi sin mem.

H. F.

Ni unuigu sur la bazo de la Moskva deklaro kaj Moskva deklaro. Eld.: La Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1963. 33 p., broŝ.

Proletoj de ĉiuj landoj unuigu por oponi nian komunan malamikon. Eld.: La Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1963. 81 p., broŝ.

Laŭdezira kalkulo de Kennedy. — Eld.: Ĉina Esperanto-Ligo, Pekino, 1962. 25 p., broŝ.

Mario Simondetti: Kiamaniere distingi la fungojn? Eld.: Stabilimento Grafico Impronta, Torino, 1961. 40 p., broŝ.

Norvega Kroniko

Red.: Karsten Langsholt

JARKUNVENOJ

Meza Distrikto de NEL.

Jarkunveno okazis 1/6 en la kabano de gesinjoroj Næss, «Espero», apud Midsandan. De la estraro ĉeestis la prez., Lars Kåre Hunnes, la kasisto, Kristian Fleischer, kaj estrarano Erling P. Næss. De GET krome ĉeestis 12 personoj, entute 15 membroj. De Skorovas Esperantoklubb bedaŭrinde neniu trovis la okazon ĉeesti la jarkunvenon.

La prez. malfermis la jarkunvenon kaj voĉlegis la jarraporton por 1963/64, kiu aprobiĝis sen rimarkoj. Poste la kasisto voĉlegis la kasraporton, kiu ankaŭ aprobiĝis sen rimarkoj.

Tiam oni pritraktis kaj diskutis la ensenditan proponon pri revizio de la leĝoj de la Distrikto. La propono estis ensendita de la prez. La novaj leĝoj aprobiĝis unuvoĉe kun kelkaj rimarketoj. La ĉefa ŝanĝo en la leĝoj estis, ke la Distrikto estonte aranĝu siajn jarkunvenojn nur ĉiun duan jaron.

Poste sekvis la elektoj, kiuj donis la jenan rezulton (1964/66):

Prez. Lars Kåre Hunnes, Trondheim (reel.); sekr. Magnus Tveit, Trondheim (reel.); kas. Kristian Fleischer, Trondheim (reel.); anoj: s.ino Synnøve Kloumann, Skorovatn (nova); f.ino Lif Berg, Trondheim (reel.); Rev.: Eilif Hellen Schei, Trondheim (reel.)

La jarkunveno estis aranĝita samtempe kun ekskurso de GET. La gastigantino, s.ino Næss, regalis nin per bona «næss-kafo», kaj ni ĝuis delikatajn buterpanojn kaj kukojn.

Post la jarkunveno ni amuzis nin per kantado kun gitarakompano de la prezidanto.

Okcidenta Distrikto de NEL

jarkunvenis en la idilia urbeto Skudeneshavn en Karmøy. Ĉeestis reprezentantoj el Bergen, Odda, Sauda, Haugesund, Stavanger krom Skudeneshavn.

Enkonduka festa kunesto okazis sabaton vespere kaj la ĉeestantojn bonvenigis O. Thormodsen. Ĉe la tre bele ornamita festotablo transdonis salutojn reprezentantoj de la respektivaj kluboj. El Bergen salutis Kjell Offerdal, el Odda Trygve Reisæter, el Sauda Arthur Bjerke, el Haugesund A. J. Smedsvik, el Stavanger Karen Kluge kaj el Skudeneshavn Didrik Mjøhus. Belajn florojn kun akompanaj salutvortoj sendis la urbestro de Skudeneshavn, O. M. Wikre.

La festo daŭris en plej bona animagordo ĝis longe post la noktomezo. Estis amuzaj ludoj kaj konkursoj kun premioj kaj aliaj distraj programeroj. Bele pianludis Gunnar Barane. Cetero oni vigle dancis.

La jarkunvenon malfermis la prez. Ove Birkeland. Antaŭ ol la kunvenantoj transiris al la tagordo, E. Vorland faris memorparoladon okaze de la forpaso de la prez. de UEA, profesoro H. Yagi, Japanujo.

Jar-raporto kaj jar-bilancio estis legataj kaj aprobataj. La raporto informis pri relative vasta agado en la Okcidenta Distrikto dum la pasinta 2-jara periodo. I. a. funkciis nombro da studrondoj.

Dum la lasta periodo la distrikta estraro estis en Haugesund. — Nun Bergen transprenis la gvidon por la sekvaj du jaroj. La nova estraro konsistas el jenaj: Leonora Christensen, prez.; Elsa Njøten, vicprez.; Kristian Sivertsen, sekr.; Kjell Offerdal, kasisto kaj Åshild Birkenes, estraranino. Anstataŭantoj: Doris Birkelund kaj Johs. Jahren. Revizoroj: Hans Lunder kaj Finn Iversen.

Dum la jarkunveno estis pritrakt-

ataj vico da aktualaj demandoj kaj la ĉeestantoj vigle partoprenis en la diskutoj. I. a. oni pritraktis planojn kaj labortaskojn por O. D. en la venontaj jaroj kaj kiel pliakktivigi kaj pliiintensigi la agadon sur la diversaj laborkampoj, kiel ekzemple en la turistrafiko, en la junulgasteja movado, interŝanĝo interlanda de gejunuloj. Oni ankaŭ atentigis pri la dezirindeco pendigi Esperant-lingvajn afiŝojn en gravaj turistlokoj, ĉe konataj vidindaĵoj k. s.

Plue estis priparolata interlanda kontaktado per sonbendoj, interŝanĝo de kulturprogramoj, popolkantoj kaj -muziko. Unu el la parolantoj konsilis ke la kluboj utiligu la eblecon pet-skribi pri komunuma mon-subvencio por la Esperanto-laboro.

La kunveno pritraktis ankaŭ la kurs- kaj studagadon kaj la demandon pri kursgvidantoj. Reprezentantoj de la kluboj informis pri labormanieroj kaj spertoj en siaj lokoj. Kunlige kun la klublaboro la repr. de Bergen informis ke tie oni sukcese ligis programojn al certaj aktualaj okazaĵoj kaj eventoj.

Rilate al la punkto Esp.-kursoj en la kadro de la lernejoj, estis dirate ke ofte la lernejoj aŭtoritatuloj montras bonvolon se la aferon oni prezentas al ili en la ĝusta maniero. Entute la parolantoj tuŝis multajn interesajn demandojn kaj estis prezentata aro da utilaj ideoj kaj opinioj.

La agrablan kaj sukcesan distrikton kunvenon finis interesa boat-ekskurso al la lumturo de Geitungen.

ORDINARAJ KUNVENOJ

«Mara Vento», Haugesund.

La finan kunvenon antaŭ la ferio «Mara Vento» okazigis kiel festan kunvenon en la fest-salono de «Skipperforeningen». Oni komencis kantaante kaj ekregis tuj festa animagordo.

La ĉefa programulo estis ĵurnalisto H. Holst Roness kiu kaptis ĉies atenton per viva kaj kolorplena programo «La printempo per vortoj kaj tonoj». Bele li vortopentris la ĉarman sezonon de l' jaro prezentante en plaĉa maniero ĝiajn apartan etoson kaj nuanc-riĉon. La priskribon li akompanis per bone elektita bukedo da printempaj poemoj kaj kantoj kiujn li muzike/kante prezentis. La tre ŝatatan programon danke aplaŭdegis la relative multaj ĉeestantoj.

La programon konsistigis ankaŭ bela pian-muziko de Gunnar Barane kaj prezento de interesa kaj plaĉkolora vojaĝfilmo kiun faris nia klubano O. J. Rønnevig.

La kunesto daŭris en plej agrabla maniero ĝis la noktaj horoj.

Klubo Esperantista en Oslo.

16/4. Okaze de la 80-jara naskiĝtago de nia klubmembro Tharald Dybing aranĝiĝis festen-tagmanĝo por li en la restoracio Blom. — Partoprenis la aranĝon la kluba estraro kaj kelkaj aliaj amikoj de li. Dum la tre bona traktado okazis salutparoladoj, transdono de donacoj kaj legado de bondezirtelegramoj.

Post la manĝado oni kafotrinkis kaj interbabilis ankoraŭ iom da tempo ĝis oni adiaŭis unu la alian. Vere estis tre agrabla kaj sukcesplena aranĝo, kiun prizorgis s-inoj Kirsten Ek kaj Bobbi Østmo.

7/5. La ĉieliran tagon la Klubo aranĝis ekskurson al Kolsås en Bærum sub la devizo «Ni renkontas la printempon», laŭ gvidado de Inger kaj Reidar Richard. — 11 membroj partoprenis, kaj ni kolektiĝis je la 11a horo ĉe Nationalteater stacio, kaj vojaĝis al stacio Hauger. Tie Støp-Bowitz klarigis pri la geologio de la distrikto, kiu estis interesa kaj instrua. Ni grimpis la monton kaj apud

la kabano ĉe la unua belvidpunkto ni konsumis nian kunmetitan manĝaĵon. — Inger kaj Reidar Richard klarigis pri la floroj kiujn ili kolektis survoje. — Kelkaj energiaj personoj ankaŭ grimpis la pli altan pinton. Survoje malsupren ni haltis ĉe la KIF-kabano, de tie 6 membroj reiris al Oslo tra Hauger, sed la aliaj 5 daŭrigis tra la arbaro kaj ĝuis la belan vidaĵon de tapiŝo de bluaj anemonoj inter la arboj. — La ekskurso estis favorata de sufiĉe bela vetero

25/5. La prez. John Berggreen bonvenigis la membrojn kaj invititojn. Li donis informojn pri:

1) *Gallup-esplorado* pri fremdlingva uzo kiu montris esperanton en la 2a loko (anglan lingvon unua) kune kun la franca kaj germana lingvoj.

2) *Alvoko pri Esperanto* kiu nun estas preta, ekzempleroj estas haveblaj.

3) *Ekzpozicio* en la universitatbiblioteko, okaze de la 150-jara datreveno de la norvega konstitucio, montrante tradukojn de la konstitucio al diversaj lingvoj, ankaŭ Esp. Tom Arbo Høeg prizorgis tradukon.

La sekretario raportanta legis la raporton pri la ekskurso al Kolsås la 7an de Majo, kiu estis aprobata. — John Berggreen legis favoran artikolon en la gazeto «Nordstrands Blad», skribitan de la redaktoro mem pri la instruado de Esperanto en Bekkelaget Skole de Astrid Mansrud. Per tio li enkondukis la programeron:

La 14 junuloj (13 knaboj kaj Marianne, la filineto de Astrid Mansrud) komencis per komuna kanto «Esperanton lernas ni» gitare akompanata de Ellen Simonsen. — La junuloj prezentis 4 skeĉojn: «Fermu la pordon, virineto», «La ŝranko», «La florbukedo», «La muro». Marianne recitis malgrandan poemon kaj la prezentado finiĝis per komuna kanto.

La junaj aktoroj tre bone kaj kurage ludis siajn rolojn, kelkaj de la knaboj eĉ en virinaj roloj. La prezentado vere estis amuza, kaj la ĉeestantoj rekompencis ilin per forta aplaŭdo. Ni esperas ke ni ankaŭ estonte povos vidi la novajn junajn esperantistojn en nia klubo kiel aktorojn aŭ membrojn de la junula grupo. Einar Gustavsen sur tabulo tre klare kaj lerte instruis nin pri la kunmetitaj tempoj de la verbo. — La lasta programpunkto estis prelego de Otto Prytz pri «La blinduloj kaj iliaj problemoj». Li pritraktis la diversajn flankojn de la vivo de la blinduloj, iliajn eblecojn por edukado kaj laboro, iliajn organizojn, gazetojn, bibliotekojn k.t.p. Fine li menciis ke la plej grava problemoj de la blinduloj estas kiel esti aprobataj kiel egalvalora membro de la socio. Kaŭze de la izoleco de la blinduloj en internatoj dum la periodo de edukado, estas nature ke ili havas malfacilaĵojn ki- am ili devas renkonti la eksteran mondon kiel memstaraj membroj de la socio. — La prelego donis al ni ampleksan sciigon pri la kondiĉoj kaj problemoj de la blinduloj, kaj ricevis fortan aplaŭdon.

4/6. Okaze de la 150-jara datreveno de la norvega konstitucio Tom Arbo Høeg prelegis: «Pri la origino de la norvega konstitucio». Li precipe pritraktis la konstitucion el juraj vidpunktoj kaj klarigis pri la evoluo de la ideoj de libereco de Rousseau, Montesquieu, la franca revolucio k. t.p. laŭ kiuj la popolo mem devas havi la potencon - popolsuverenecon. Li finis per la vortoj «Nia konstitucia leĝo estas vivanta leĝo.»

La prez. dankis Høeg pro la tre interesa prelego kiu estis prezentata en eminenta formo kaj admirinde klara lingvo, kaj la ĉeestantoj montris ke ili alte taksis la bonan pre-

legon per forta aplaŭdo.

Por ilustrati la prelegon de Arbo Høeg estis prezentata Bildo en 2 scenoj: «Konstitucio kaj Storting». Lektoro Ivar Aars ellaboris la bildojn por memorfesto en Aars & Voss lernejo, kaj C. Støp-Bowitz tradukis ilin al Esperanto. En la unua sceno - 6 membroj de la konstitucia komisiono en Eidsvoll 1814 diskutas la formuladon de la Konstitucio - partoprenis John Berggreen, C. Støp-Bowitz, Rolf Bugge-Paulsen, Einar Gustavsen, John Selbekk kaj Otto Koren. En la dua sceno — 4 membroj de la «Storting 1964» interparolas kun du el la Eidsvolluloj en la Stortingskonstruaĵo 1964 — partoprenis Støp-Bowitz, R. Bugge-Paulsen, J. Selbekk, Kirsten Ek, J. Berggreen kaj O. Koren. La kanto «Meze en fera tempo» kaj «La Espero» estis kantataj, akompanataj per piano de Aslaug Refsing.

La lasta programero estis «Divenkonkurso» aranĝata de la Junulara Grupo gvidata de Ellen Tangen.

C. Støp-Bowitz diris memorigajn vortojn okaze de la forpaso de profesoro Hideo Yagi, la prez. de UEA kaj la membroj honoris lian memoron per mallonga silenco.

11/6. Kunveno en la somerdomo de la familio Støp-Bowitz, Oksval, Nesodden. — La prez. malfermis la kunvenon kaj dankis al gesinjoroj Støp-Bowitz ĉar ili ankaŭ tiun ĉi jaron afable invitis la klubon havi la lastan kunvenon antaŭ la somerferio en sia somerdomo. — Oni kantis la Kluban Marŝon kaj «Mariston logas vasta mar», akompanataj sur akordiono de Støp-Bowitz. — La sekretario legis la raporton pri la klubkunveno 4/6, kiu estis aprobata.

C. Støp-Bowitz disdonis diplomojn al jenaj kiuj plenumis ekzamenon: Gunleik Bergrud, Olav Ekkeren, Inger Gjertsen, Solveig Hauger, Aslaug

Refsing kaj Bjarne Sorknes kaj al la infanoj de la kurso de Astrid Mansrud en Bekkelaget Skole, kiuj faris ekzamenon: Kjell Andresen, Petter Bogen, Ørnulf Daler, Einar Kasperen, Marianne Mansrud, Jan Stensrud, Rolf Strøm, Stein Undheim, Sverre Undheim, Kjell Aaser. Ankaŭ ricevis diplomojn jenaj du knaboj kiuj partoprenis la kurson, sed ne faris ekzamenon: Ole Lencker kaj Odd Erik Olafsen. — C. Støp-Bowitz dankis al ili por ilia intereso kaj admonis ilin daŭrigi la studadon de la internacia lingvo.

«La Norda Lumo», Tromsø,

kunvenis 20/5. La prez. laŭtlegis leteron de C. Støp-Bowitz okaze de la 30a jaro post la kluba fondiĝo.

Pritraktata estis ankaŭ Esperantonnytt, propono pri la mondbatalo kaj la turismo. Fine ni ĝuis bonan kafon kaj buterpanojn kaj kukojn en la hejmo de s-ro Baardsen, kie ni renkontiĝis.

Grupo Esperantista de Trondheim

7/4. Ni komencis per kanto n.ro 1, «Kanto de l' ligo». Post la referato la prez. voĉlegis cirkulerojn, i. a. pri la kongresoj en Hago kaj Tokio, kaj pri la mondkampanjo de UNO la venontan jaron. Nia gasto estis episkopo Rūth, kiu paroladis pri la 2. Vatikan-koncilio en Romo. La romkatolikoj nun sincere klopodas reunuigi la diversajn kristanajn ekleziojn. Plue oni ankaŭ decidis enkonduki pli da gepatra lingvo en la mesoj, anstataŭ la latina lingvo. La episkopo respondis kelkajn demandojn.

21/4. La malferma kanto estis n.ro 37 «Ni marŝas kun bonhumor!», kaj poste la referato sekvis. Tiam s-ro Karterud paroladis pri la opero *Barbereren i Sevilla*. Li interese rakontis pri la verkisto kaj la unua prezent-

ado de la opero. Per magnetofono ni aŭskultis la plej belajn pecojn de la opero. — S.ro Næss rakontis pri la jarkunveno de la abstinencaj fervojistoj en Finnlando. Ilia gazeto havas Esperanto-kolonon.

5/5. Ni kantis n.ron 32 «La Norvego». Post la referato, du reprez. de Banan-Matthiessen prezentis amuzan kaj instruon filmon pri la bananfrukto. Ni vidis kiel la indiĝenoj per tranĉiloj detranĉis la verdajn bananrapolojn kaj portis ilin sur kapo al kolektejoj, kie oni post kontrolo enpakis la rapolojn per plastfolioj. La bananoj sendiĝas per ŝipo al Norvegujo, kie la maturigado okazis. — La virinoj ricevis multajn ideojn pri la uzado de ĉi tiu frukto. Poste ni ĝuis bongustajn bananojn.

19/5. Post la kanto n.ro 42, «Verdiĝas la deklivoj», la prez. faris memparoladon pri la prez. de UEA, Prof. Hideo Yagi, kiu forpasis la 6an de majo 1964. Kelkaj klubaj aferoj estis pritraktataj, kaj poste ni provis fari novan krucvortenigmon por Norvega Esperantisto. Fine okazis la lotado de la medicina ŝranko. La feliĉa gajnanto s-ro Andersen estis kurioze la sama, kiu faris kaj donacis al ni la ŝrankon!

Korespondu!

Bulgarino, 31-jara, deziras kor. kun geesperantistoj norvegaj. — Jilkova Popova, Naroden teatär, Dimitrovgrad, Bulgario.

Pola komencantino dez. kor. kun genorvegoj. S.ino Maria Wronska, ul. Rydla 7/21, Kraków, Polujo.

Juna polo deziras interŝanĝi poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn kun genorvegoj. — S.ro Wozniak Wojciech, Dziekanowice, Pow. Myslenice, Pol.

Hispana filatelisto deziras interŝanĝi modernajn, uzitajn hispanajn poŝtmarkojn kontraŭ norvegaj. — S.ro Eduardo Domingo Aparici, Plaza Redonda, 9, Valencia, Hispanujo.

Mi volonte ŝatus korespondi kun iu samideano el via lando. Mi estas 51-jara oficisto. D.ro Antonín Stadník, Leninova 16, Olomouc, Ĉeĥoslovakujo

Bulgara admiranto de Norvegujo dez. kor. kun genorvegoj. S.ro Mois Avramof, Kompleks Istok Blok 14, Sofia, Bulgarujo.

35-jara lokomotivestro dez. interŝ. ilustritajn poŝtkartojn kun norv. gesamideanoj. Václav Braun, SNP 605, Hradec, Králové III, Ĉeĥoslovakujo.

Norsk Esperanto-Forbund (Norvega Esperantista Ligo)

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30
Kontoradresse: Nedre Slottsgt. 3 III, Oslo
Telefon: 42 47 79
Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30—16.30

Turisma Servo: Boks 942, Oslo.
Postgiro 100.32

Esperantoforlaget A/s (Eldonejo Esperanto A/s)

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.31
Kontoradresse: Nedre Slottsgt. 3 III, Oslo
Telefon: 42 47 79

Ĉefdelegito de U. E. A.:

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,
Oslo-Bryn. Postgiro 133.29

La redakcio:

Privata adreso de la ĉefredaktoro:
Johan Hammond Rosbach,
C. E. Holters vei 7C, Sarpsborg: - Uzu tiun
adreson, kiam temas pri urĝaj sendaĵoj.
Telefona: 54 7 27